

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 68 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 februaro 1926

"WHAT WILL IT GET ME?"

This is the eternal question of the practical man, or the selfish man, whichever you may choose to call him. In any case he can't be ignored. Esperanto is not a religion, nor a system of philosophy, nor a moral crusade, and any idealistic benefit the world may derive therefrom is a purely secondary concern. The essence of the Esperanto movement is utilitarian,—nay, strikes the bottom of the hardest materialism. The Declaration adopted at the First World Esperanto Congress, held in Boulogne-sur-Mer, France, in 1905, sets forth this program:

"The Esperanto movement is an effort to spread thruout the world the use of a language neutral to all mankind, which, without obtruding itself upon the domestic life of the peoples, and in no sense seeking to oust the extant "national" tongues, may furnish natives of different countries the means of mutual understanding, may serve as a compromise language of public institutions in those countries where various races are at loggerheads on the language question, and in which may be published such works as may be of equal interest for all peoples. Any further idea which this or that Esperantist may connect with the Esperanto movement is his own purely private concern, for which the Esperanto movement is not responsible."

Boiled down, the movement is for the worldwide elimination of lost motion: in place of a thousand difficult mediums of international communication the substitution of just one easy medium.

Such a movement, in its very nature, cannot get a lasting foothold unless it "delivers the goods," and that "right off the reel." The question we have now to consider is, what has Esperanto to offer the average American to justify his trouble in learning it? In attempting to answer this we will try to be perfectly frank and candid, and eliminate all jokers from our pack.

Let us first of all take the business man, the man with something to sell—we don't care what, be it a ouija board or a frying pan. We ask him this opening question, Is he satisfied with a home market or does he seek a market abroad? If the former he does not need Esperanto. If the latter he will need one or more foreign languages (provided of course he aims farther than English-speaking countries), and Esperanto is right now the best investment in the linguistic line he can make for the money and time expended.

Let us make a cursory comparison. Suppose he picks the natural language that will give him the widest field, to wit, Spanish. We have good reason to believe, further, that this is the easiest natural language to learn of any in the world. A mastery of Spanish will open to him Spain,

Mexico, Cuba, Porto Rico, the Philippines, and all South America save Brazil. The problem is how to attain that mastery, even of the simplest natural language on earth. Pardon a personal allusion. The writer has been thru two Spanish courses. He has been working on the language off and on for about fifteen years. He is a college graduate, with a special aptitude for language, and a special training in five other languages. But he must confess that he would not at present time attempt to write the simplest business letter in Spanish—and that despite the fact that he knows the grammar of the language well and has a fairly extensive dictionary vocabulary. It is the idiom that gets you in Spanish and every other natural language. This idiom, without which no natural language is intelligible, we are safe in saying cannot be practically acquired without constant association with the natives of that language, which generally means two or three years residence, at least, in a country where the language is a mother tongue.

One other course is open for the merchant who desires a foreign field. That is to give up the idea of learning the foreign tongue himself, and hire clerks and interpreters who are conversant with the language, both for the home office and for each of the various foreign branches. Of course we know that such a system is so enormously expensive that it is open only to commercial houses of some capital. For the average business firm it is out of the question, and foreign business may be expediently dubbed "sour grapes."

But turn now to Esperanto, and what offers? Esperanto may be mastered within a year for any commercial purpose, however technical. There is no need to visit a foreign country for the purpose of learning this language, and a student can get a good working knowledge of the same without ever meeting another

Esperantist, either domestic or foreign. Pardon another personal allusion. The writer learned Esperanto from three textbooks: a thin elementary one, a 460-page quarto "advanced" one, and a third known as a "Sintakso" (Syntax). He went thru the first in three days, the second took him perhaps three months, and the third was sandwiched in somewhere between. He had no teacher. He had never seen another Esperantist. He had no correspondence as yet with foreign countries. But in 1908 he attended the First Congress of American Esperantists at Chautauqua, N. Y. At that Congress he heard a Swiss Esperantists deliver a series of lectures, thirty or forty minutes each in length, and to his, the writer's, amazement he understood the whole series of lectures from start to finish. He could converse with other Esperantists without the smallest difficulty. Within a year he was chosen American correspondent for the leading literary magazine of the then Esperanto world. Compare this experience with the same fellow's experience with the Spanish language, related two paragraphs before.

We have set a year as the outside limit for the mastery of the language for business purposes. As a matter of fact in most lines of business the actual learning time for the average person would be within six months. The writer's textbook apparatus cost him between \$1.50 and \$2.00, he doesn't exactly remember. In a city with an Esperanto class or classes a person may attend such a class either free or at a nominal charge. If unable to attend an oral class, and yet desirous of a teacher, he may obtain one by correspondence.

Now with this small expenditure of time and money what kind of a field is open for the business man? Spanish, with its crucial difficulties of acquisition, is the key to the Spanish-speaking countries only. Esper-

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

anto connects you with Spanish-speaking countries plus the rest of the civilized world! There are no "ifs" or "buts" to it. Don't judge the size of the Esperanto movement by the size of this paper. America, as we showed in our editorial three months ago, is (to her shame!) hugging the rear of the Esperanto movement. But the individual American merchant can derive exactly as much profit from the international language with his countrymen blind to its worldwide diffusion, as if they were falling over themselves to get into the Esperanto market,—indeed more so, for he has that much less competition from this side.

What has he to do to get into the stream, after learning the language? He must first join the Universal Esperanto Association. This will cost him 12/- a year. He then receives annually the Yearbook of the Esperanto Movement, and monthly the official organ of the said Association. At very moderate rates he may advertise in the said Yearbook and first of all reach directly the thousands of readers of the same, in 32 countries of Europe, 7 of Asia, 7 of Africa, 10 of the Americas, and 2 in Oceania—in all 58 countries thruout the world. This Association has thus far established "consulates" in over 1300 cities and towns in these 58 countries. Get out your circulars, pamphlets and other advertising literature in Esperanto, and ship them to the chief "delegates" at the head of these 1300 odd consulates, and, at the cost of their expenses, they will distribute them for you among the Esperantist public of their respective territories. If you do not care to take the trouble to mail matter yourself to 1300 centers, then pay a little extra and join U. E. A. as one of the 150 odd commercial "enterprises" affiliated with it. By so doing you receive an ad. free of charge in the Yearbook, and you have the privilege of shipping all your worldwide advertising direct to U. E. A. headquarters at Geneva, Switzerland, which will, without further bother to you, undertake the distribution of this literature to the various consulates thru the world charging you simply with the expenses of doing so). If you wish you can handle the correspondence and orders accruing from this adver-

tising directly from your home office; or else thru the delegates of U. E. A. in various centers you can hire an Esperanto-speaking agent, who will attend to your business for you at the foreign end.

To support our point we quote a very little from the 57 page Report on Esperanto by the General Secretariat of the League of Nations, adopted by the Third Assembly of the League in 1922:

"A circular or a pamphlet printed in Esperanto can be circulated thruout the whole world at a very slight expense, without the trouble of translating it into 20 or 30 languages and of finding agents to distribute it. Almost all international exhibitions use Esperanto to advertise in foreign countries and find it profitable to print their prospectuses in that language.

"To our knowledge, this was done in the case of the Exhibitions at Paris, Lyons, Leipzig, Frankfurt, Basle, Padua, Lisbon, Prague, Vienna, Reichenberg, and Helsingfors. For these exhibitions, Esperanto was used in correspondence; seven of them established an Esperanto section.

"In 1921, the International Labor Office made a small experiment. It published in Esperanto three documents on its work and organization and had them distributed by the representatives of the U. E. A. The result was the appearance in the daily newspapers of 219 special articles on the International Labor Office in 21 different languages, cuttings of which were collected by the International Labor Office. Since that time, the International Labor Office answers, in Esperanto, letters which reach it in that language. The Brazilian Government published in Esperanto the official documents about its centenary and its exhibition. We have had before us catalogs in Esperanto from commercial houses of every kind and from every country.

Of course this brief editorial cannot take up the matter of the application of Esperanto to any specific line of business. Anyone wishing to "slip in the clutch" on that can get full details by application.

—El Amerika Esperantisto,

ESPERANTA STILO. *

Du specoj de stilo ŝajnas maleblaj en Esperanto: la lingvaĵo arkaika kaj la lingvaĵo popola.

Sed ankaŭ tiuj ĉi malebloj ne estas nepraj.

Esperanto evoluas. Vortoj, stilmanieroj elmondiĝas. Tio ĉi okazas mal rapide, sed certe. Legante verkojn el la unua epoko de Esperanto, ekzemple la unuan lernolibron aŭ la Krestomation, oni trovas tie formojn ne plu uzatajn en la moderna Esperanto. Elrigardi anstataŭ aspekti, dome anst. hejme, laboremece anst. laboreme, tiam anst. tiam, kiel se anstataŭ kvazaŭ rifuziĝi anstataŭ rezigni ktp. — jen formoj, kiuj povus jam nun veki impreson de arkaikeco, se . . . — Sed pri ĉi tio poste.

Ankaŭ la lingvaĵo popola ne estas tute malebla. Pri ĝi jam okazis kelkaj provoj kaj ne tute malsukcesaj. Verbotempo nuntempa anstataŭ estintempa en rakotado, ofta uzo de ke kaj kaj, inverse de vortordo iras mi, vidas li ktp. povas doni al la stilo ian popolan aromon. Krome uzo de ne plene konvenaj vortoj, draŝi anst. bati, oreli anst. aŭskulti, piedi anst. iri, heni anst. ridegi, plenbuŝi anst. avido manĝi ktp. La "Proverbaro" de Zamenhof donas ĉi rilate jam belan materialon. Sed certe tre bona estus kolekto de tiaj esprimoj, kunmetita de internacia kunlaborantaro.

Vi vidas ke la Esperanta stilo havas riĉajn perspektivojn. Nun ĝi estas ankoraŭ en ĝerma stato, sed per la mirinda strukturo de la lingvo kaj per la fakto, ke ĝia evoluo okazas tute laŭ la maniero de la vivantaj lingvoj, ĝia kresko kaj riĉa branĉornamo nepre devas veni. Pli aŭ malpli frue certe ankaŭ niaj lingvaj institucioj venkos la malhelpojn, kiuj nun malebligas la pli intensan laboron, kaj, esprimvortaroj, proverbaroj, kritikaj lingvaj studoj; pri famaj esperantaj verkoj ebligos, ke ĉio jam farita kaj trovita ne estu enterigita en disaj, ampleksaj volumoj, sed estu facile alirebla al ĉiuj. Kaj nur tiam oni surprize rekonos, kian riĉan trezoran de esprimformoj kaj nuancoj posedas Esperanto jam ankaŭ nun.

Sed al la dezirata evoluo de la Esperanta stilo oni bezonas ankoraŭ ion, kio estas la plej grava afero laŭ mia opinio. Ĝi estas la unueco de la stilo. Tre grave estas emfaze akcenti ĉi

tion, ĉar multaj eminentaj Esperantistoj ne rekonis ankoraŭ sufiĉe ĝian esencan gravecon. Ofte mi legis el bonaj plumoj, ke traduko el iu nacia lingvo konservu specialaĵojn de la respektiva lingvo, ke iu traduko estas ĉarma, ĉar ĝi montras al ni interesajn idiotismojn nacilingvaj. Ĉi tiuj opinioj estas ne nur eraraj, sed ankaŭ danĝeraj por la esperanta stilo. Esperanto havas sian propran spiriton, ĉiu deflankiĝo de ĉi tiu spirito estas simple eraro, same kondamninda, kiel fremdaj naciismoj en iu nacia lingvo. La rumana lingvo, ekzemple, ne havas participojn, ĉu tradukante el ĝi ni esprimu ĉiun partupon per aparta frazo? Per ĉi tio ni tute ne akiros la saman efekton, ĉar tia frazkonstruo en la originalo estas tute natura, dum en Esperanto ĝi estas nekutima, peza. Kie do estas la limo de ĉi tiu permeso pri la naciaj apartaĵoj.

Pripensu, ni volas havi stilektojn! Pro tio ĉi bezonas simplan, ĝeneralan stilon, kanvason, sur kiu oni povas brodi. Tia stilo jam ekzistas, estas troveble en la verkoj de la plej bonaj Esperantaj stilistoj: Zamenhof, Kabe, Grabowski, ktp. Ilia stilo havas propran spiriton, kaj ĉi tiu spirito de la lingvo malfermiĝas por ĉiu, kiu zorgo okupiĝas pri bonaj verkoj. Kun iom da sperto oni bone povas konstati, kiam diferencas ĉi tiu spirito de la spirito de lia nacia lingvo, kaj tiam oni estos vere ĝenata, rimarkante, ke en iun lingvaĵon enŝtelis sin fremdlingva spirito. Kiu ne havas ankoraŭ la certan senton pri Esperanto, tiu ekzercu sin per simplaj tekstoj, partoprenu superajn kursojn, legu kaj legu kaj legu, sed literaturajn ĉefverkojn li lasu en trankvilo. Ĉar nek la originalo, nek nia lingvo dankos al li lian penon.

Do ekzistas propra spirito, ĝenerala, ĉiutaga stilo. Ĉiu, kiu aspiras verkistajn laŭrojn, devas nepre disponi pri ĉi tiu stilo. Ĉiu, kiu volas vere ĝui Esperantan literaturon, devas rimarki ĉiun deflankiĝon de ĉi tiu stilo. Ĉar, se okazas tia deflankiĝo, ĝi devas signifi ion! ne tion, ke la tradukinto estas anglo aŭ japano, nek tion ke li estas komencanto aŭ eterna komencanto, sed ian nuancon, kiun ano de ĉiu ajn nacio esprimus Esperante per la sama stilapartaĵo. Nur tiamaniere ni povas atingi, ke ian intencan nekutiman esprimformon la

leganto ne rigardu kiel nacilingvan idiotismon aŭ lingvan kapricon de la tradukinto, sed li eksentu ĝin kiel arkaikan aŭ popolan aromon, aŭ kiel stilapartaĵon de la aŭtoro.

Tia ĝenerala stilo ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj nur havante ĝin povas Esperanto kun ili konkuri en la kampoj de l'stilo, t. e. en la literaturo kaj poezio.

Kompreneble ĉi tio ne signifas ke la naciaj lingvoj, el kiuj devenas kaj riĉiĝas Esperanto, ne povas ĝin efiki, evoluigi per novaj esprimformoj. Sed ĉiu tia nova esprimo estas bona nur, se ĝi povas kaj devas fariĝi ĝenerala. do ĝi konformas al la internacia pensmaniero, al la spirito de Esperanto kaj donas solvon por mankanta esprimo de nuanco. Esperanto estas vivanta korpo, do same kiel la homa organismo, ĝi ne povas toleri en si fremdan elementon, ĝi ĝenas, dolorigas, malsanigas ĝin. La eksterajn efikojn ĝi devas dismeti kaj sintezi, konformigi al si, kiel la homa korpo asimilas la nutraĵojn; nur tiel fariĝos vere vivantaj partoj de la lingvo.

Tiamaniere mi imagas la konstantan fekundiĝon de la lingva spirito, la senĉesan evoluon de nia lingvo, per la tradukadoj.

K. deKalocsav.

* La jena fragmento estas ĉerpita el la parolado de s-ro Kalocsay, kiun li preparis por la ĉi-jaraj literaturaj "Floraj Ludoj" en Katalunujo.

La kompleta parolado estas presita en "Kataluna Esperantisto," VI, VII, VIII 1925. Red.

ESPERANTISTA PAROLEJO ONI LAŬDAS.

S-ro Percy T. B. Hudson el Melbourne, Aŭstralio, kore dankas al S-ro George F. H. Clarke del. en Capetown, (Sud-Afriko); S-ro E. C. Mawbey vic. del. en Johanesburg, (Sud-Afriko); S-ro Pedro Gomez Del., kaj S-ro Andres Villafranca, vic. del.; en Buenos Aires, (Argentino); S-ro Pedro Casas del., kaj multaj aliaj afablaj amikoj en Montevideo, (Urugvajo); S-ro L. Sepulveda Cuadra, kaj S-ro Armando Castillo, en Santiago Ĉilio; pro afablaj akceptoj kaj gravaj servoj dum lia lasta ĉirkaŭ la mondvojaĝo.

RECENZO.

RESPONDOJ AL KONTRAŬ-RELIGIAS PAROLOJ, de Msgr. De Segur, laŭ la germana traduko de P. H. Muller, S.V.D., (12a eldono), esperantigis D-ro A. Halbedl. Presita kaj eldonita ĉe "Styria" Universitata presejo kaj eldonejo, Graz, Aŭstrujo.

Ĉi tiu estas libro tradukita el la franca germanen kaj esperantigita el tiu traduko. Estas nerefuteble, ke tradukado devus esti rekte el la lingvo de la originalo por doni la plej kontentigan rezulton. Ankaŭ estas evidente ke, se oni ne sekvas ĉi tiun regulon, bazarda miskompreno aŭ malĝusta traduko estos kopiata en estontan tradukon. Certe ni havas elstarantan ekzemplon de sukcesplena nereakta traduko en "Batalo de l' vivo," kiun Zamenhof tradukis el germana traduko de la angla originalo, tamen — "unu hirundo ne faras someron."

La enhavo estas 53 kontraŭdiroj al religio kaj ties refuto, de la eminenta romkatolika prelado Segur kaj okupas 200 paĝojn. La valoro de tia verko estas mem evidenta en ĉi tiuj tagoj de materialismo. La tradukinto en sia antaŭparolo, interalie, diras, S-ro N. N. . . . traesploris la manuskripton laŭ lingva vidpunkto kaj, plej kompetenta por tio, li glatigis ofte mian lingvaĵon. Se vi sciis la nomon, vi ankaŭ sciis, ke helpis min unu el niaj plej bonaj stilistoj modernaj." Laŭ mia opinio, la lingvaĵo, kvankam plejparte korekta, estas neniel flulegbla, kaj la efekto de la nacia lingvo de la tradukinto estas ĉie rekonebla. Tamen, Segur konsilas, ke oni ne, ĉe unufojo, legu multon de la libro, kaj, se oni sekvas tiun konsilon, oni povas eltiri la sencon el la iom malklara vortordo kaj samtempe submetiĝi al la bonaj veroj de la Diamanta prelado. (C.W.B.)

Professor Caj-Juan-Pei, of the Pekin University, speaking at a local Esperanto meeting said: "If Chinese were able to communicate their ideas by means of Esperanto Americans and Europeans would be able to understand the Chinese and would become their friends. Everybody should learn Esperanto and then the necessity of learning the difficult Chinese language would be done away with. Therefore the Chinese must above all else do their utmost to aid the propaganda of Esperanto."

KRONIKO.

MELBOURNE. V.—Ŝajnis ke la anoj de la Melburna Esperanto Societo, deziris fari bonan komenciĝon en la nova jaro, ĉar ili ĉeestis la unuajn kunvenojn grandnombre. Post la studperiodo, oni plezure pasigis la tempon per la rakonto de ŝercoj kaj anekdotoj kaj je la sekvinta semajno Sro. P. Hudson, donis tre interesan paroladon pri parto de sia vojaĝo en Sudafroko. Li parolis pri la mirindaĵoj de la lando,—ĝia pezaĵo, indigenoj, moroj de la loĝantaro, geografiaj formoj de la lando, ktp., kaj la anoj atendas kun plezuro la daŭrigon de tia interesplena temo. La sinjoro afable promesis tion fari, tre baldaŭ.

NOVA ZELANDO.—S-ro W. H. King nia laborema kunlaboranto jam multe sukcesis pri la kompilado de Nova Zelanda adresaro, li jam sukcesis ricevi preskaŭ 300 adresojn, kaj skribas, ke baldaŭ la adresaro estos eĉ pli ampleksa. Li ankaŭ nun laboras por fondi Esperanta Grupo ĉe Wellington, kaj informas nin, ke la samideanoj ĉe Auckland ankaŭ nun laboras por fondi centra klubo ĉe Auckland, tiuj sukcesoj certe finos nur en la restariĝo de la Nova Zelanda Asocio.

AUCKLAND, Nov-Zelando. La tag-jurnaloj raportas ke samideanoj en tiu ĉi urbo ĝuis sukcesplenan piknikon ĉe Brown's Bay dum 15 decembro. Kvankam kelkaj el la ĉeestantaro komencis la studon de Esperanto antaŭ nur kelkaj monatoj, tiuj povas paroli en la lingvo kun miriga facileco. Esperanto klasoj okazas ĉiusemajno.

WELLINGTON, Nov-Zelando. S-ro Darwin, el Melburno, vizitis tiun ĉi urbon dum mezjanuaro, post libertempo ĉe la suda insulo. Estis plezure vidi la sinjoron, kiu partoprenis la Kvina Kongreso ĉe Melburno, lastan jaron.

KURIOZAJON PRI MELKADO.

Sciigas sinjoro D-ro Berthold von Stetten en n-ro 13 de "Umschau," semajna gazeto, Frankfurt. Laŭ sia sciigo li ricevis 6, 5 procentan kromkvanton da lakto de bovinaj kaj kaprinaj ĉiam, kiam la melkado okazis kun muzikakompanado. Kiel muzikilojn li uzis gurdon, violonon kaj gramofonon. Vere profitiga kaj rekommendinda provo!

—Heroldo.

HERE AND THERE.

In Belgium s-ro K. Huysmans, who is very favourably inclined to Esperanto, and who introduced Esperanto into the official evening schools of Brussels has been appointed Minister of Science and the Fine Arts in the Belgian Cabinet.

Mr. W. T. Middleborough, Davy Street, Hobart—"Permit me to say that as an old pressman I am taking particular interest in 'La Suda Krucio.' I trust that you will hold your own against all comers."

The efforts of the Belgian Esperanto Propaganda Committee has been so successful, that Esperanto is now being taught in the evening classes of the public schools; there are two classes for beginners, and two for advanced pupils, instructed by officially paid teachers—and Esperanto is now used for the official announcements of the town of Antwerp.

The Minister of Instruction has again made valid the permission to instruct Esperanto in the Public Schools of Budapest.

The powerful Radio Station of Berlin "Voxhaus" has from the 14th November broadcasted lessons in Esperanto for beginners—this makes the third series of lessons being broadcasted in Berlin. The Gazette "Du Funkstunde" which has 22,000 readers has several times drawn attention to these lessons. Commissioned by the directors of the Berlin Radio Station, Julius Gluck, president of the Berlin Esperanto League, has published an Esperanto instruction book for Radio listeners. The book consists of 6 parts, each part consisting of 4 Esperanto Radio talks; the first part which appeared on the 10th November was sold out in 10 days, and a new edition was necessary, the second edition was sold out in two days. S-ro Gluck then invited the Radio listeners to join a group for exercise in speaking Esperanto, and immediately received the names of 518 persons, who wished to learn. Esperanto is the fashion in Berlin.

La gvidulaj nacioj, homoj kaj sciencaj centroj povas helpi esperanton per oficialaj ordonoj, per almenaŭ duhora studo de la gramatiko, kaj publikigante resumajn esperantajn en ĉiu scienca verko, kiel unue faras nun Madrid Cientifico.

LETERO DE SINJORINA SAKURAI

Sinjinorina Sizue Sakurai estas bona samideano, kiu loĝas en Genevo kune kun sia edzo, kiu servas ĉe Internacia Labora Oficejo. Eble ŝi estas la unua japana Esperantistino, kiu ĉeestis la Universalan Esperantan Kongreson. Ŝi skribis al sia amikino en Tokio jene.

Nia Universala Kongreso malfermiĝis la 2-an de aŭgusto kaj fermiĝos hodiaŭvespere (la 7-an).

Ĉeestas 1,500 delegitoj el 40 nacioj. Ĉie sur stratoj kaj en tramoj troviĝas multaj, kiuj portas verdan stelon sur siaj brustoj, kaj parolas en Esperanto.

Ĉie flirtas Esperantaj standardoj. Estas tre interese, ke samideanoj el diversaj landoj portas siajn diversajn naciajn kostumojn, sed ĉiuj parolas la saman lingvon.

Ili parolas al mi kiel al konatulino, ĉar mi ankaŭ portas verdan stelon. Mi sentas, ke mi kvazaŭ estus inter "Esperanto Nacio," se tia ekzistus en la mondo.

Mi sentas min tre feliĉa, ĉeestante la Kongreson, sed samtempe tre domaĝas, ke vi ne estas inter ni.

Unu samideano ĉiam ĉeestas la Kongreson sen supervesto kaj unu samideano portas verdan veston kun stelforma punkto, ili estas rimarkinda vidaĵo, sed preskaŭ ĉiuj geĉeestantoj sinvestas modeste, kaj ne troviĝas dande vestitaj homoj.

Mi ankoraŭ ne povas paroli bone en Esperanto, sed la Kongreso donas al mi bonan ŝancon por ekzercado; ĉiufoje mi komprenas pli facile.

Kongresaj paroladoj ĉiuj estis tiel fluaj kaj belaj. La Esperanta dramo Ginevra estis ludita en granda teatro en Genevo. Ĝi estis tre bela kaj tre lerte ludita. Poste, unu poeto deklamis sian poemon, kaj unu finnlandano kantis Esperantan popolkanton. Ili ankaŭ estis tre belaj.

En la raporto pri nia movado en la pasinta jaro, ni sentis ĝojegon, sciiginte, ke nia internacia lingvo, dank' al senlaca klopodo de multaj entuziasmaj Esperantistoj, prosperis en diversaj aferoj.

Mi vidis diversajn Esperantistojn; kaj pensas, ke estas tre grave, ke nia movado estu gvidata de homoj de firma kaj nobla karaktero, kiu povas fari vere bonan propagandon.

Hieraŭvespere ni havis Victoria Hall, kiu estas muzika halo luksa kaj granda.

Diverslandaj gesamideanoj plenigis la halon. Multaj delegitoj faris bonajn kaj lertajn paroladojn. Kelkaj el ili, kiuj havis blankajn harojn, bone konis Zamenhof.

Ni kune kantis himnojn "Fratoj, manon donu kore" kaj "Espero."

Gesamideanoj ĉe la Kongreso estis tiel afablaj al mi, ke ili parolas al mi kaj faras aferon por mi antaŭ ol mi ekparolas.

Ĉe la Kongreso, mi trovis, ke ili ĉiuj havas honestajn, bonajn, afablajn kaj sincerajn korojn, kiuj ofte troviĝas en tiuj de kamparanoj.

Vi trovos la programon kaj organizajn aferojn de la Kongreso en la Kongresa Libro, kiun mi sendis al vi.

—El La Revuo Orienta.

RADIO-ESPERANTISTA FESTO EN BARCELONO.

Pro la fino de la kurso de Esperanto, okazos dum la monato oktobro, grava kaj kurioza Esperantista festo. En tiu tago, la tuta programo estos esperanta kaj partoprenos en ĝi diversaj gesamideanoj: malnovaj, kiel D-ro. Bartomeu, kaj novaj, kiel estas kelkaj el la lernitoj per Radio-Barcelono, ekzemple Fino. Castellvi, tre lerta kantistino, kaj aliaj.

Sed la plej kurioza afero konsistos ke oni dissendos paroladojn de D-ro. Zamenhof, de Profesoro Bourlet, de Graboski kaj aliaj mortintaj samideanoj, kies fonografaĵoj cilindroj posedas la malnova samideano S-ro. Alfonso Sabadell, kiu, tute afable, permesos tion.

La fervora radio-esperantisto D-ro. Bartomeu, provis tiujn fonografacilindrojn per Radio-Barcelono kaj li atingis bonan sukceson.

KONGRESO DE KONTOSCIENCO.

La unua Brazilia Kongreso de Kontoscienco, kunveninta en Rio-de-Janeiro, dum la monato Aŭgusto, sub la honora prezido de Sro Dro Sampaio Vidal, Ministro de l'Financoj, aprobis unuanime la jenan proponon prezentitan de Dro Carlos Domingues kaj raportitan de Dro Francisco Ferreira de Mello, vicdirektoro de la Komerca Akademio de Rio-de-Janeiro:

"Devas esti enmetita en la komercajn kursojn la instruado de la internacia lingvo 'Esperanto,' kiel helpa mondlingvo, la sola efika solvo de la grava problemo de la internacia komunikado."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ tiu ĉi adreso—"La Suda Kruc", Box 731 F, P. O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia:—Amerika Esperantisto, 1; Bulgara Esperantisto, 1, 2; Brazilia Esperantisto, 7—9; Belga Esperantisto, 8—9; Bulteno Antverpena, 11; Romanuja Esperanto, 9; Heroldo de Esperanto, 89 ĝis 98; Itala Esperanto Revuo, 10, 11, 12; Informservo de Labora Oficejo, 105, 106; International Language, 12; La Unuigita Tutmondaro, dec.; La Nova Tago, 3; La Revue de la Univers, 28; Le Monde Esperantiste, 5; La Ridanta Esperantisto, 3; La Ora Epoko, 1; Oomoto, 12, 13; Svenska Esperanto, 12; Samosa Esperantisto, 1—2, 3—4.

GRAMOFONDISKOJ.

Kiuj volas havi gramofondiskojn devus turni sin al la Brita Esperanta Societo, 17, Hart Street, Bloomsbury, London, W. C. 1. Antaŭ nelonge kun la helpo de la Linguaphone Instituto. REA fabrikigis serion da diskoj parolataj de nia fama D-ro Privat. Kvin diskoj, kun teksto, en albumo kostas £2.2.—. Ili entenas paroladojn kaj deklamojn t. k. "Zamenhofo pri Homaro." "La Espero," "Ho mia kor," "Al la fratoj" kaj aliaj poemoj; "Zamenhof pri Elparolado kaj Stilo: citaĵoj en "Kursa Lernolibro" kaj "Karlo," kaj "La Kavaliroj de la Verda Stelo" de Privat, citaĵoj el "Ginevro" kaj poemoj el "Tra l' Silento" de Privat.

Ankaŭ kompleta lernkurso parolata de D-ro Privat estas pretaj; en 15 duflankaj diskoj kun lernolibro, kiu kostas £6.6.—. Oni skribu pro ambaŭ al BEA laŭ supra adreso aŭ al Linguaphone Institute, 24-27 High Holborn, London, W. C. Ankaŭ oni novas mendi pere de la bibliotekisto

de la Melburna Esperanto-Societo, Box 731 f, P. O. Elizabeth St., Melbourne; sed oni devos aldoni iom al la kostoj por impostaj kaj poŝtel-spezoj. (Red.)

Melburna Esperanto-Societo. Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunveno: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunveno kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. **FREE TO YOU.**